



9

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA
ESPERANTISTA ASOCIO

SEPTEMBRO 1962

E N H A V O

	Paĝo
* * * Al lingva perfektigo	1
* * * 48-a Universala kongreso de Esperanto	3
Ĥristo Smirnenski. Roza Ljuksemburg (versaĵo)	4
Penĉo Slavejkov. Sur mia tomb' elkreskos floroj (versaĵo)	4
A. S. Puŝkin. Fragmento el poemeto (versaĵo)	4
Nijazĭ Ĥjuseinov. Fenestro a la mondo (versaĵo)	4
Stojan Daskalov. Kara amiko (rakonto)	5
Nikola Aleksiev. De Kopenhago al Sofio	9
Atanas Gaev. David Sasonov	12
Rudolf Burmajster. Denove mi vizitos vian landon	14
Ru Bossong. Miaj impresoj el nuntempa Bulgario	14

La fotoj sur la kovrilo estas de la 35-a kongreso de la bulgaraj esperantistoj en Burgas:

1. La prezidantaro de la kongreso,
2. La solena inaŭguro.

Abonkotizo : jara — 1,4 levoj, duonjara — 0,7 lv. Por eksterlando — 2 lv, 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,6 lv.

Reklamtarifo : 0,15 levoj por cm²; korespondanconcoj : 5 stotinkoj por ĉiu vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpaĝo — 60 lv.

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Inĝ. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P., O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5

SOVETUNIO: Ivan Palkin, Mitnaja ul. 52/54 kv. 19, Moskva, B—162

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.



AL LINGVA PERFEKTIĜO

Nia esperantistaro amase vizitis nian 35-an Esperanto-kongreson en Burgas. La sukceso estis pli granda ol dum la pasinta kongreso en Târnovo. Tio montras, ke nia movado estas en konstanta kresko kaj supreniro.

Nia esperantistaro ĝuas la komprenon, simpatian kaj apogon de nia socio. Sed tiu konstato pri sukceso kaj favora stato devas ankoraŭ pli mobilizi niajn fortojn kaj nian laboron!

Nur post malpli ol unu jaro okazos la 48-a universala Esperanto-kongreso en nia ĉefurbo Sofio. Ĉiu universala kongreso estas grava evento por la lando, kie ĝi okazas. Por nia esperantistaro la kongreso estos speciala ekzomeno en ĉiuj rilatoj. La kongreson devas partopreni nur homoj, regantaj la lingvon. Jen pro kio ni devas deklari la nunan jaron „jaro de lingva perfektigo“.

Ekde nun ĉiuj esperantistaj societoj en nia lando devas pridiskuti serioze la bonan organizon de la nova lernojaro. En ĉiuj societoj devas ekzisti kolektivo ĉefronte kun la respondeculo pri la kursoj. En speciala organizo kunveno de la societo oni devos pritrakti la laboron dum la nova lernjaro kaj pripensi la eviton de la ĝisnunaj mankoj. Ĉiuj respondeculoj pri la kursoj — estraranoj de la societoj — helpatoj de la aktivuloj kaj kune kun ili devas fari planon pri efektiviĝo de la estraraj decidoj. Oni atente devas decidi la malfermon de kursoj nur tie, kie estas certa la sukceso. Estas rekomendinda la organizo de kursoj en la lernejoj, entreprenoj, institucioj, kie la demando pri ejo, hejtado, priservado estos pli facile solvebla ol en la tuturbaj kursoj por kiuj la societoj devas pagi luon kaj ne ĉiam oni povas trovi konvenan tempon kaj tagon.

Estas necesaj diversgradaj kursoj — por komencantoj, progresintoj kaj kursgvidantoj. La lastaj ne devas esti multnombraj. La ordinarnaj kursoj devas konsisti el 20—40 gekursanoj. Jam de longjara praktiko montriĝis, ke la kursoj kun kurstakso havas pli bonan disciplinon.

Ni devas komenci la organizadon de la kursoj. La malfermon de la lernjaro antaŭiras propaganda semajno kiu ordinare okazas en la lasta semajno de septembro. Dum ĝi oni devas organizi la enskribadon por la antaŭfiksitaĵ kursoj. Oni nepre antaŭe devas anonci la lokon kaj la tempon de la lekcioj kaj la kursgvidanton. La praktiko enskribi dezirantojn lerni Esperanton sen sciigo pri la dato de la komenco de la kurso kaj la ceteraj necesaj informoj, estas kondamninda, ĉar ĝi jam en la komenco fiaskigas la aferon. Se la kursoj ne ekfunkcias jam en la komenco de oktobro kun severe

(daŭrigo sur p. 2)

ELTIRAĴO EL PROTOKOLO № 22

de kunsido de Scienca konsilantaro de Instituto de geografio de Akademio de sciencoj de USSR

de 19 junio 1962

Prezidanto: akademiano I. P. Gerasimov

Vicprezidanto: d-ro de geografiaj sciencoj M. I. Nejštadt

Ĉeestis 17 membroj de Konsilantaro kaj 30 kunlaborantoj de Instituto kaj de aliaj invititaj organizaĵoj.

Aŭskultis: Raportojn de d-ro de geografiaj sciencoj D. L. Armand: 1) Problemo pri internacia lingvo en geografio; 2) Transskribo de geografiaj nomoj en Esperanto kaj ĝia uzo por ordigo de nacilingvaj transskriboj.

Post diskutado oni rezoluciiis:

1) Aprobas la raportojn de D. L. Armand, sendotajn al la unua konferenco pri lingvaj problemoj en scienco, okazonta en Kopenhago je la 4—11 aŭgusto 1962.

2) Agnoskas, ke internacia helplingvo Esperanto povas alporti signifoplenan helpon por reciproka konatiĝo de geografoj kun publikataj en diverslandaj revuoj sciencaj verkoj, same kiel por senperaj kontaktoj dum internaciaj renkontoj.

3) Notas, ke unu el unuavicaĵaj aplikoj de Esperanto devas esti publikado en revuoj, serioj eldonoj kaj libroj de resumoj, anotacioj kaj referatoj, tradukitaj en ĉi tiun internacian lingvon (same kiel en nacilingvojn).

4) Agnoskas dezirenda organizon en Instituto de Geografio ĉe la Akademio de la Sciencoj de USSR de esperantista rondeto por esploro de praktika vojo pri uzado de Esperanto en geografio (kompilo de fakterminaroj, ellaboro de transskribado de geografiaj nomoj k. t. p.).

NOVA SEKCIO DE BEA

Sekcio de la agrikulturaj kaj arbarkulturaj specialistoj kaj laboristoj.

Dum la 35-a bulgara Esperanto-kongreso en Burgas grupo da specialistoj: agronomoj zooteknikistoj, arbarspecialistoj k. a. fondis sektion de la agrikulturaj kaj arbarkulturaj specialistoj kaj laboristoj ĉe BEA.

La celo de la sekcio estas organizi la specialistojn kaj la laboristojn, kiuj laboras en la regionoj de la agrikulturo kaj la arbarkulturo, kaj utiligi Esperanton en la scienco kaj la praktiko en tiu grava kampo de nia ekonomio.

Respondeculo pri la sekcio estas k-do **Ŝterjo Kukuŝev**, agronomo, **Peŝtera**, Bulgario.

Al tiu ĉi adreso oni sendu aliĝojn el la tuta lando.

TRA LA LIBRARO

DOMENICO PASTORELLO: REVELACIO

El itata esperantigis Filippo Franceschi. 16 paĝoj, 12×17 cm. Eldonaĵo ne vendata. Laŭ peto senpage ricevebla de la aŭtoro D-ro ing. D. Pastorello, Fos sur Mer (B. d. Rh.). Francio.

La verketo citas el la unua libro de T. Livius kaj el la Nova Testamento plurajn tekstojn, pruvante ilian fundamentan egalecon per sistema komparado. La aŭtoro celas pruvi per tio, ke la legendo pri la naskiĝo, vivo kaj morto de Jesuo estas nenio alia ol kliŝa kopio de la korespondanta legendo pri la naskiĝo, vivo kaj morto de Jesuo. La broŝuro estas interesa kaj incita.

(daŭrigo de p. I)

difinita tempo de la lekcionoj, ni perdos la dezirantojn lerni Esperanton, ĉar aliaj organizaĵoj kaj aranĝoj okupos ties tempon.

Apartan atenton dum tiu ĉi jaro ni devas direkti al la prefektigaj kursoj. La formoj estas diversaj — kursoj por progresintoj, rondoj, viva gazeto, regulaj kunvenoj por praktikado de la lingvo. Ĉiu societo elektu la plej konvenajn por la lokaj kondiĉoj formojn. Helpe al la perfektigantoj BE aperigos en ĉiu numero respondojn al lingvaj demandoj. La societoj faru siajn planojn al tiu grava tasko — la plialtigo de la lingva nivelo!



48-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN SOFIO

3—10 VIII 1963

Kongres-kotizoj	ĝis 31.12.62 b. lev.	ĝis 31.3.63 b. lev.	post 31.3.63 b. lev.
Kongresano	14,00	16,00	18,00
Edz(in)o de kongresano	7,00	8,00	9,00
Junul(in)o ne pli ol 20 jara	5,00	5,50	6,50
Student(in)o de 20 ĝis 30 jara	8,50	9,50	11,00
Blindulo	7,00	8,00	9,00

RABATOJ: Plenaĝaj aliĝintoj, kiuj estas individuaj membroj de U. E. A. (t. e. ricevas minimume la Jarlibron) rajtas rabaton de 1,60 bulg. lev. Edzino de membro rajtas rabaton de duono de tiu sumo. La rabato ne validas por aliaj familianoj, gejunuloj, studentoj, blinduloj kaj kiu ajn alia kategorio de kongresanoj.

STUDENTOJ: La speciala tarifo por studentoj validas nur, se kun la aliĝilo troviĝas atesto de lia(sia) fakultato.

BLINDULOJ: La speciala tarifo por blinduloj kaj iliaj gvidantoj validas nur, se kun la aliĝilo troviĝas atesto de okulkuracisto aŭ blindulorganizaĵo.

INSTRUKCIOJ pri aliĝo al la 48-a Universala Kongreso de Esperanto:

1) Ĉiu partoprenonto nepre plenigu apartan aliĝilon. Se oni ne havas aliĝilon uzu samformatan paperon.

2) Donu ĉiujn petitajn detalojn. Skribu klare, tajpe aŭ preslitere. Aliĝoj ne klare skribitaj restos netraktitaj.

3) Sendu la aliĝilon kaj la pagon al unu el la indikitaj adresoj (U. E. A. en Rotterdam, landaj Perantoj, 48-a Universala Kongreso).

4) Pagu nepre al la sama instanco al kiu vi sendas la aliĝilon.

5) Aliĝilo estos traktita nur post ricevo de la pago.

6) La kongreskotizo ne estas repagebla, eĉ se la kongresano ne partoprenas la Kongreson.

7) Se oni deziras sendi kun la aliĝkotizo monon por sia kredo ĉe la kongreso, oni povas tion noti sur la aliĝilo.

8) Pagante por alia persono, sciigu per la aliĝilo la celon de la pago kaj nepre klare skribu la kompletan adreson.

9) Kongresan karton oni ne rajtas fordoni, vendi aŭ interŝanĝi.

Aliĝiloj por bulgaroj estas riceveblaj de lokaj Esperanto-societoj aŭ rekte de Bulgara Esperantista Asocio, Sofia, poŝtkesto 66. La aliĝo efektiviĝas per la lokaj societoj. La individuaj membroj aliĝas rekte per LKK.

La kongreskotizon sendu nur per la bankkonto N . . . de 48-a Universala Kongreso de Esperanto, Sofia.

La aliĝilojn sendu al: 48-a Universala Kongreso de Esperanto, Sofia, poŝtkesto 44.

Ne forgesu: UEA akceptas aliĝojn nur de bulgaraj esperantistoj.

ROZA LJUKSEMBURG

Neniam ni delasos fermuskolojn,
kaj fruntojn ne mallevos ni,
ĉar turnas plu la temp' per firma volo
la radon de la histori'.

Kaj super ĝi fajrerbrilantan glavon
akrigas ruĝa ŝtalgigant',
kaj en rigard' infana lia rava
ridetas la venkanta tag'.

Sed en animoj kiel nigra ŝtono
aperas kara rememor' —
ĝi staras en la blueflama fono
de la malĝojo kaj angor'.

La mort' kelkiam estas tro mizera,
la vivo kruda — en malhel',
kaj en la nigra enteriga ĉerko
anstataŭ korpo kuŝas stel'.

Leviĝas ĉe l' rigard' vulkana flamo —
vulkan' de faro kaj esper',
por enterigi unu koron tamen —
malvasta estas tuta ter'.

Tradukis: At. Lakov

Penĉo Slavejkov

SUR MIA TOMB' ELKRESKOS FLOROJ

Elkreskos floroj — kron' sur mia tomb' —
ne finkantitaj kantoj de la koro.
Kaj inter ili — ŝi — en tuta mond'
la plej belega kaj aroma floro. . .

Ne prikantita restis tiu flor'!
Ĉi ebriligis min, la ekzaltitan,
per sorĉ-parfumo... sed en hezitema kor'
forvelkis mia kant' nefinkantita!

Tradukis: Simeon M. Simeonov

FRAGMENTO EL POEMETO

„Aŭtuno“

Aŭtun', malgaja temp'! La revo por okuloj.
Agrabla estas via milda bel'.
Naturan velkon amas mi, revulo, —
arbaron similantan al fabel'.
Min emocias vento — petolulo,
kaj per malhel' kovrita la ĉiel',
de l' sun' maloftaj la radioj lacaj,
kaj malproksimaj de la nord' minacoj.

El la rusa: VI. Ĉernov

FENESTRO AL LA MONDO

Dediĉita al la 35-a kongreso de BEA

Malfermis oni fenestron al la mondo,
tra ĝi mi rigardas al la Nigra maro;
kaj konstruis oni unu verdan ponton —
sur ĝi vigle marŝas verdstela anaro.

Horizonton vidas mi bela kaj pura
kaj saluton sendas al homoj bonvolaj,
kiujn al feliĉo gvidas stel' purpura —
la gvidant' fidela de ĉiuj popoloj.

Mi rigardon helan fiksas malproksimen
al la maro blua, al tuta homaro,
kie fontas flame la esper' senlima
kaj resonas tie ĉe la bord' de l' maro.

Min obsedas amo al kvin kontinentoj,
al la homoj nigraj, blankaj, flavaj, vere
en la kor' ekbolas amikecaj sentoj
kaj la streb' por paco, justo kaj libero.

Varĝe malfermiĝu vi fenestro brila
al homar' montranta vojon al la paco,
kiun ni defendas firme kun jubilo
por ke nin ne trafu la militminaco.

Burgas
15. 7. 1962

Nijazi Ĥjuseinov
v. Ĉernoŝene, (Kirgali)

TUJ ALIĜU AL LA 48-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO!

La aliĝoj okazas per lokaj societoj. La nombro de la bulgaraj -kongresontoj estas limigita. Kongreskotizon kun aliĝilo sendu al adreso:
48-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, P. K. 44, SOFIA.

LKK akceptas aliĝojn nur de bulgaraj esperantistoj.

KARA AMIKO*

La ruĝvizaĝa hotelmastro frapis sur la pordon, kaj sen atendi respondon, eniris. Sur la refaldo de sia jako li surhavis larĝan ruĝan rubandon.

— Vi devas tuj forlasi la ĉambron! — li kapgestis severe, kaj la haŭto de lia grasdika kolo faldiĝis je tri sulk-etaĝoj.

La iomete grizhara viro, ĵus instalinta sin en la ĉambro, estis senvestiĝinta por iom ripozi. En la milda septembra lumo lia laca vizaĝo kvazaŭ plektita el araneaĵsimilaj faldetoj, aspektis kiel gravurita oraĵo. La okuloj, enkaviĝintaj profunde sub la maldensaj brovoj, ekrapis mirigite al la suproj de la akraj vangostoj. Liaj kunpremitaj sekaj lipoj kuntiriĝis en obstinan faldon ĉe unu ekstremo. La naztruoj perceptis ŝajne pli forte la odoron de malnova gastejo kaj ĉio fariĝis al li malagrabla.

— Sed mi. . . ja mi luis ĝin por du-tri tagoj, dum mi trovos privatan loĝejon! — flustris, sed en lia voĉo grincis ofendiĝo.

Kiel flataĉe lin akceptis nur antaŭ horo tiu ĉi maljuna hotelmastro, kaj nun li montras la dentojn! Kiu scias, pro kia sia gasto li murmuris al li: „Foriru!“

Ne, li ne obeos. Li kontraŭstaros. La luanto de la ĉambro estis instruisto kaj laŭkutime li vidis eĉ en la bagateloj grandan maljuston kaj malkaŝe protestis.

— La kamaradoj trovu por vi privatan loĝejon. . . aŭ ĉe iuj konatoj! — murmuris la hotelmastro, kvazaŭ li volus diri: „Se vi estus grava birdo, oni nun zorgus pri vi!“

Ĝuste tiun sarkasmon kaj tiun ĉi malrespekton la instruisto sentis en sia ĉiam ofendata animo, kaj li tre ĉagreniĝis kaj hirtiĝis malamike. Vere, se li estus irinta per la ĉevalĉaro rekte al la komitato, liaj kamaradoj tuj lokigus lin en iun ella rekviziiciitaj domoj de riĉuloj. Li havis ankaŭ konatojn, ĉe kiuj li povus pasigi du aŭ tri tagojn. Sed pro lia multjara instruista profesio, en lia konscio treege evoluis la denaska sento de ĝenateco.

— Mi ne havas konatojn. . . Kaj el tie ĉi mi ne eliros! — la instruisto respondis aprupte, sidigis dorsflanke al la hotelmastro, prenis la ĵurnalon de sur la tablo, kaj duonturninte la kapon, diris provoke: — Ne pensu, ke nun vi povas arbitre fari ĉion, kiel en la pasinteco. . .

Tiuj akraj vortoj rapide elflugis kvazaŭ el la freŝdata ĵurnalo de la nova popola reĝimo, dolorpikis la hotelmastron, kaj sur lia vizaĝo pentriĝis palaj makuloj striataj de violbluaj vejnetoj. Li senbrue elŝteligis, kaj la instruisto nerve ekpaŝis tra la ĉambro. La malnovaj tabuloj de la lavita planko grincetis kaj ŝajne resonis harmonie kun lia doloro.

Post tiom da persekutoj kaj translokiĝoj de unu vilago al la alia la instruisto estis invitita okupi laboroficon en la urbo. Li kontraŭargumentis, ke li ne meritas tiun ĉi promocion, kaj indikis aliajn homojn, kiuj meritis ĝin pli ol li. Sed oni konvinkis lin, ke oni bezonas ĉie multajn homojn, homojn fidelajn. Kaj li konsentis. Li forlasis la vilaĝon ĝuste nun, kiam li intencis denove kunvoki la infanojn kaj jam sen singardemo kaj timo malkaŝe alparoli kaj priklanti la liberon. Li sopiris al tiu ĉi tago, kiel al plej granda festo. Ĉiun

* La titolo de la rakonto en la bulgara originalo estas skribita en Esperanto.

matenon ĉe la sunleviĝo li pensis pri ĝi ĉiufoje, kiam la sonorilo de la lernejo sonoris kaj la infanoj kantante eniris en kolono la malnovan lernejon; ĉe ĉiu leciono kaj ĉe ĉiu promonado al la proksima arbaro li vidis siajn edukatojn, kiuj alportis al li florojn, liberaj homoj. Kaj nun li devis forlasi ilin kaj okupiĝi pri laboristoj, klerigi ilin. Kaj li demandis sin, ĉu li povos sukcese plenumi la novan taskon, organizi la laboristojn, ĉar ja li neniam antaŭe estis enirinta fabrikon. Poste, en sia imago, li vidis sin inter ili, kiel en la mezo de pli aĝaj lernantoj, interparolanta kun ili dum la laborpaŭzoj, ludanta muzikaĵojn antaŭ ili dum ekskursoj en la montaro, kaj li image vidis, ke la laboro progresas pli entuziasme ol en la vilaĝa lernejo. . .

La hotelmastro, malaperinta por momento, denove aperis kaj ĝenis lin per sia peza paŝobruo kaj spirego.

— Nu, elportu vian pakajon! — li ekkriis jam ordone.

— Lasu min ĉi ankvila! — energie sin turnis al li la malgrasa instruisto.

La grasa vizaĝo de la hotelmastro kaj lia zumanta raŭka voĉo rememorigis al li pri la malamataj inspektoroj, pri la policistoj, kiuj faris ne unufoje traserĉojn kaj plorigis lian familion, pri la vilaĝestro kaj la pastro, kiuj spionis kaj senĉese denuncis lin, serĉante motivojn por akuzi lin, pri ĉio amara, kion ĝis nun la vivo al li proponis. Kaj hirtiĝinte, li atakis:

— Forlasu mian ĉambron! Mi volas ripozi!

— Sed. . . ĉiuj ĉambroj — la hotelmastro repaŝis kaj ekparolis malpli severe — estas destinitaj por sovetaĵ oficiroj.

— Ĉu por ili?

Lia vizaĝo, kvazaŭ elkoviĝinte el la rompita ŝelo de l'kolero, ekradiis. Liaj okuloj, nur antaŭ momento elstarantaj pro indigno, plenigis de profunda milda brilo, kiu ŝanĝis ilian malhelan koloron en hele juglandan. Eĉ liaj malgrasaj sulkigintaj vangoj ekstremis, lumigate de ilia lum.

— Kial do vi ne klarigis tion! . . . — ekridetis kulpokonscie la instruisto, kaj jam oni vidis, ke la hotelmastro ĉesis ŝajni al li tiel abomeninda. — Se la afero estas tia, do mi tuj. . . tuj preparos mian pakajon.

Kaj lia pakajo konsistis el du grandaj pakoj da libroj, kiujn li estis metinta senorde sur la tablon. Kiel li povus denove kunpaki ĉion ĉi! La valizeton kun difektitaj seruroj li estis plenŝtopinta per vestaĵoj!

— Pli rapide! — ekstaris super lia kapo la hotelmastro. — Ĉar la homoj tuj venos.

— Ĉu vere? — ekstremis la instruisto.

Tra la larĝe malfermita pordo jam penetris tumulto, parolbruo kaj ruslingvaj vortoj. La instruisto ekurgis sin. Li rapide surmetis sian iom eluzitan jakon kaj ĝi kaŝis la krudan flikajon, surkudritan per blanka fadeno en formo de kruco sub la maldekstra parto de lia brusto. Li iom streĉetendis sian ĉifitan kolumon kaj la pantalonon pufitan ĉe la genuoj, dezirante havigi al si pli elegantan aspekton, kvazaŭ li pretigus sin eniri la klasĉambron. Li eĉ ordigis la malordigitan liton kaj provis rektiĝi la kapetojn de la velkkliniĝintaj floretoj, kiujn li estis trempinta en la trinkvazo. Kien ajn li iris, li kutimis enakvigi florojn, por ke ili memorigu al li la klasĉambron. . . Li rapidis kunpreni la librojn, sed, aŭdinte la knaradon de botoj kaj fragmentojn de frazoj en rusa lingvo, la emocio rigidigis lin. La libroj forglitis el liaj manoj, ne bone kuŝiĝis unu ĉe la alia, ne obeis la pakviciĝo. Se li havus nun grandan valizon aŭ paktukon, li kunprenus kaj forportus ilin. Se li antaŭe sciis ĉion ĉi, li ne liberigus la ĉevalĉaron, kiu alveturigis lin el la vilaĝo. Kaj nun. . . La sola solvo estas kunpreni nur la pli gravajn, kaj la

ceterajn lasi al la hotelmastro por ke li konservu ilin. Sed kio estis la grava? Ĉiuj objektoj estis karaj al li. Kun ili li veturis de vilaĝo al vilaĝo kvazaŭ kun kamaradoj kaj ekzilitoj. El tiuj ĉi libroj tutajn jarojn li ĉerpis kredon kaj forton por flustradi al junuloj kaj maljunuloj, por ekflamigi nur per unu vorto aŭ unu rigardo la fajron en iliaj okuloj. Ĉiuj ili memorigis al li ion. Jen tiu ĉi libro, ekzemple, la dika, bindita per led. Ĝi estis la evangelio. Li aĉetis ĝin jam antaŭlonge per la mono de sia unua salajro kaj poste li gardis kaj kaŝis ĝin kiel eksterlegan batalanton. Fine dum polica traserĉado oni trafis ĝin sur la tablo en lia hejmo. La policisto malfermis ĝin, tralegis ĝian titolon „La Kapitalo“ kaj konkludis, ke libro, en kiu oni pritraktas la temon pri kapitalo, ne povas esti kontraŭleĝa. Li remetis ĝin sur la tablon kaj sin gluis al alia: „Aspirantoj de oficoj“. Kiom ajn la instruisto klarigis al li, ke en tiu libro estas nenio danĝera kaj oni mokridos lin en la policejo, li forportis ĝin kun la profunda suspekto, ke se temas pri aspirantoj, ĝi do estas kontraŭ la ŝtato. Kaj tiu romano, kiun li mem bindis kelkajn fojojn, ĉar ĝi disŝirigis pro multa legado, cementis la komunisman ideon de multaj animoj. Sennombrajn konfliktojn kun la polico kaj enketojn ĝi kaŭzis: de kie li prenis ĝin kaj al kiu li donis ĝin por legado... Sian propran vojon, sian suferon kaj sian liberon havas ankaŭ ĉi tiu malgranda libreto de versaĵoj. Kaj lacigite li iufoje klinis la kapon kaj liaj okuloj pleniĝis de la humideco de l' malespero, ĝi redonis al li la fortojn. Do kien li enmetu ĝin? Ĉis krevorisko li plenŝtopis la valizeton, kaj ankaŭ la poŝojn de la palto kaj de la pantalono. Li ŝovis la malgrandan kolekton de versaĵoj en sian ĉebruston, plilongigis la paperŝnuron je du aŭ tri lokoj, ĉirkaŭligis la pakojn da libroj duone ĉirkaŭvolvitaj per papero, kaj pene ekportis ilin.

— Jen tiu ĉi ĉambro estas por vi, taviŝĉ (kamarado) — la hotelmastro tranĉis la silenton per sia rauka voĉo, kvazaŭ ne la koron de la instruisto, sed la paperŝnuron li tranĉis, la pako disŝirigis, kaj la libroj falis ĉiufanken.

Sur la sojlo ekstaris juna, svelta soveta oficiro. La instruisto repaŝis kvazaŭ inter li kaj la oficiro formiĝis abismo. La sulkoj sin desegnis reliefe sur lia frunto, lia hararo distaŭzigis argentkolora interne kaj donis al li senhelpan kaj lulpokonscian aspekton. La rigidmovi hotelmastro kliniĝis kaj spiregante komencis kolekti la librojn.

— Oni avertis vin, tamen vi... tiom longe faris la aferon...

Kaj la instruisto staris kaj iel hontigite rigardis tiun, pro kiu li mem volis liberigi la ĉambron. La unuan fojon li vidis soldaton de la Ruĝa Armeo, kaj li estis eĉ oficiro. En la vilaĝo oni atendis la liberigantojn dum du tagoj kaj du noktoj, sed ili pasis laŭ alia vojo. La oficiro estis sunbrunigita, kun rustokolora vizaĝo pro la longa batalvojo, sed en liaj okuloj, malgraŭ la kruelecaĵoj de la milito, lumis grajneto de nobleco. Al la instruisto ŝajnis, ke post kiam ili interrenkontis siajn rigardojn, ĉi tiu grajneto pligrandiĝas, per sia brilo tute plenigas liajn okulojn...

La ruĝarmea oficiro alpaŝis, ĵetis rigardon al la malorde falintaj libroj, scivole fiksas la okulojn al unu el ili, kiu portis la titolon: „F. M. Dostojevskij — Profeto de la Revolucio“. Li kaŝis en la anguloj de siaj lipoj naskiĝantan rideton kaj ekrigardis la amasojn da lernolibroj sur la tablo. La instruisto mem ne sciis, pro kio li estis kunpreninta ankaŭ ilin, kaj la kajerojn kun la plej bonaj faritaj skribekzercoj de la lernantoj, notlibrojn, kolektojn da popolaj fabeloj kaj kantoj kaj albumon da akvareloj. Kaj en tiu vitrokesto oni vidis antikvajn monerojn alkudritajn sur malhela veluro, ĉirkaŭligitajn mineralojn kaj alpinglitajn papiliojn. Kaj el la ne fermita tirkesto montriĝis fasko da

leteroj. Sur unu el la ilustritaj poŝtkartoj li tralegis manskribitan alparolon en Esperanto: „Kara Amiko“. . . kaj li komprenis, ke tiu ĉi homo korespondas kun multaj homoj el la tuta mondo.

— A vy... kto? (Kaj vi... kiu estas?) — li demandis mirigite.

— Ja... učitel! (Mi... estas instruisto!) — respondis modeste la instruisto per voĉo surdigiĝita pro emocio, kaj singene ridetis.

La oficiro okulesploris la eluzitan valizeton kun rompitaĵoj, ĉirkaŭkaptis perokule la preskaŭ kadukan figuron kun pala, konsumita, sed inteligenta vizaĝo, kaj sur la fono de sia profesia malriĉeco la instruisto ŝajnis al li tute delikata, preskaŭ senkarna, kvazaŭ li estusiu spirito de neprofitemo kaj sindona servado al la popolo. Tiuj ĉi semantoj de klereco verŝajne similas unu la alian en ĉiuj mondpartoj. Pro la kontaktoj kun la infanoj ili akiras por ĉiam infanan animpurecon kaj simplecon kaj ian sublimecon super la teraj aferoj — ili juĝas pri la aferoj same kiel la infanoj, ne laŭ ilia materia valoro, sed laŭ tio, ĉu ili estas fonto de ĝojo kaj beleco. Pro la longedaŭra laboro kun la animoj de la homoj, sur iliaj vizaĝoj ĉiam kuŝas la signo de intelekta vivo.

— Zdra'stvujte, učitel (Saluton, instruisto) — la oficiro streĉrektigis sin kiel antaŭ ĉefo, metis la manon ĉe la vizieron kaj interklakigis la botojn.

La grajneto, kiu plenigis liajn okulojn, surverŝis per lumo lian tutan lacigitan vizaĝon. La instruisto fariĝis, pro la surprizo, ankoraŭ pli maldika. La disradiana fasko da lumo igis lin aspekti kuprokolora kiel soleca grenspiko, poŝtrikolte forlasita en la stoplokampo. La oficiro staris rigide, duonferminte la okulojn, kaj ne mallevis la manon. Kiun homon li honoris per sia militista salutgesto? Ĉu li ne komprenis: vid-al-vide staras ordinara vilaĝa instruisto! Kaj ĝuste kiam li decidis klarigi la miskomprenon, la oficiro kaptis respektive lian manon palan, kun elstarantaj vejnoj kaj longaj, kretosekaj fingroj, premis ĝin kaj diris:

— Privje't, učitel! (Saluton, instruisto!)

Varmo ekfluus al la koro de la instruisto kaj karesis ĝin. Do, ne estas eraro — la soveta oficiro honorsalutas la nekonatan bulgaran instruiston! Kaj li intencis forlasi la instruistan profesion! . . . La instruisto ektremis, perdis la spiron, ne sciante, kion fari. Li rigardis la oficiron kaj ŝajnis al li, ke sur lia vizaĝo kuŝas tia granda laciĝo, ke, se li eksidus, li* tuj ekdormus. Li devis kunpreni pli rapide siajn pakojn kaj lasi la homon en la ĉambro por ripozi.

La instruisto febre prenis la pakojn da libroj, sed la oficiro metis la manon sur lian ŝultron.

— Astavtel! . . . (Lasu! . . .)

— Kial do? — La insrtisto rigardis lin mirigite.

— Bonvolu, taviarišč (kamarado) oficiro! Tiu ĉambro estas por vi! — la hotelmastro riverencis komplezeme.

— Tio ne estas ebla! Li estas popola instruisto! — riproĉis lin la oficiro.

Poste li turnis sin afable al la instruisto:

— Ne, ne, tiu ĉi ĉambro estas via, instruisto!

— Ĉu vi vidis, kion vi nun faris per tiuj ĉi viaj libroj! — la hotelmastro snufbruis sub la nazo kaj alproksimiginte al la oficiro, li timrespektive lin tuŝis. — Restu tie ĉi. Ni trovos al li alian, privatan loĝejon!

— Ne, ne maltrankviligu lin, mi petas! — la oficiro levis la manon kaj adiaŭis la instruiston. — Pardonu!

ОТ КОПЕНХАГЕН — ЗА СОФИЯ

Гостоприемните датски есперантисти поеха през последните шест години още веднаж върху себе си организирането на универсален есперантски конгрес. Всеки, който има известна представа за големия труд необходим при такава отговорна работа и извършван на напълно доброволни начала, ще отдаде дължимото уважение към всички, които са работили съвместно с ЛКК при изпълнението на тази трудна задача.

Като се изключат някои неголеми пропуски, трябва да се признае, че ЛКК създаде съвсем нормални условия за работа на конгреса.

Този път на конгреса бяха дошли 1550 есперантисти от 40 страни, предимно от западноевропейските. Необичайно хладното за сезона време помогна да се съсредоточи вниманието на конгресистите върху деловата страна в работата на конгреса. Проведоха се с по-голям или по-малък успех много и разнообразни срещи на отделните специализирани организации, две общи заседания с интересен и важен дневен ред, в който централно място зае въпросът за задачите на първичните организации по изпълнението на работните планове на УЕА. Състояха се няколко почти целодневни заседания на Комитета на УЕА, които бяха публични. На тях бе приет отчетът на Ръководството за изтеклия период, прие се Вторият работен план на УЕА за следващия най-близък период, избрано бе с пълно единодушие ново ръководство, а самия комитет бе попълнен с нови членове, приети бяха като колективни членове на УЕА Унгарският есперантски съюз и Ливанският есперантски съюз.

(daŭrigo sur pĝ. 10).

(daŭrigo de pĝ. 8)

Kaj rigardante lin kun rideto, li aldiris en Esperanto:

— Kara amiko!...

Poste kviete, kiel sia rideto, li malaperis. Silenta kaj konsternita, la instruisto restis en la mezo de siaj libroj. Lia ĉambreto estis malgranda por ampleksi lian emocion. En la silento antaŭ liaj okuloj ekbrilis malgrandaj ruĝaj steletoj, forfluginte kiel kokcineloj de sur la kepo de la soveta oficiro, de sur liaj epoletoj, ili plimultiĝis per sia vibrado, plenigis la ĉambron, flugis for eksteren en la aeron super la urbo, ekvibris en la tuta mondo. . .

Senfortiĝinte, la instruisto sidigis sur la seĝon, malfermis la malnovan albumon, en kiu jam ek de la unua jaro de sia instruista profesio li notis satatajn versaĵojn kaj pensojn, desegnis bildetojn. Kaj sur la lasta senteksta pago per tremanta mano li enskribis kiel versaĵon ŝprucintan el la koro mem:

„La 12-an de septembro 1944. Soveta oficiro honorsalutis nekonatan bulgaran instruiston meritintan ĝin per nenio!...“

El liaj okuloj senfortaj deteni ĝin falis larmo kaj rompiĝis en belan steleton ĝuste sub la teksto.

La instruisto ekstremis, kvazaŭ la lerneja sonorilo sonus, kaj li estus malfruiginta. Kunpreninte siajn pakojn, li vokigis fiakron kaj revenis por ĉiam en la vilaĝon.

Tradukis : Geo Ĥarŝev

Четиримата членове на Комитета на УЕА от България участваха редовно в неговите заседания и според силите си се стремяха да помагат за укрепване на единодействието и за вземане на решения, които обединяват всички членове на Комитета около задачите, залегнали във Втория работен план.

От България присъстваха на конгреса около двайсетина души, бошинството от които са есперантисти с голям опит. Те организираха специален щанд „48 УЕК в София“, където почти през целия ден биваше оживено. Щандът бе красиво оформен с големи цветни и черно-бели снимки на природни, исторически, архитектурни и други забележителности на България. Хубаво впечатление правеше специално нарисуваният цветен плакат, който призоваваше конгресистите да дойдат и на конгреса в София. Мнозина се отбиваха да получат информационни материали за нашата страна, да се осведомят по валутни въпроси, по цените на хотели и ресторанти, както и да питат за свои познати кореспонденти защо не са дошли на конгреса. Десетки есперантисти от западните страни още веднага внесоха своите конгресни такси, за да присъствуват на конгреса в София. Българският щанд положи началото на онази къртовска организаторско-пропагандистка работа за масово присъединяване към следния конгрес. Проявеният голям интерес към нашата страна ни изпълва с увереност, че в София ще дойдат много чуждестранни есперантисти, особено от западните страни.

Речта на българския представител при тържественото откриване на конгреса в концертната зала на красивия централен градски парк „Тиволи“ бе посрещната с неколkokратни одобрения. Конгресът посрещна с пълно разбиране и одобрение задачите, които 35-ият конгрес на БЕС в Бургас постави пред българските есперантисти.

Мястото не ми позволява да се спра на всички многобройни прояви на конгреса. Налага се обаче, макар и накратко, да се направят някои изводи по-специално във връзка с бъдещата работа на БЕС и LKK по провеждането в София на 48-я УЕК.

Ние вече огласихме тържествено в Копенхаген решението да посрещнем конгреса на БЕК в София с най-малко 6.000 члена на БЕС. Осъществяването на тази задача ще издигне високо авторитета на българските есперантисти в цял свят.

Сега на всички дружества им предстои много и сериозна работа за организационно и финансово затягане, за грижлива и задълбочена езикова подготовка, за откриване на курсове по есперанто и привличане на завършилите за членове на есперантски дружества.

Кореспондентските връзки, които българските есперантисти вече имат или ще създадат в недалечно бъдеще, особено с есперантистите от западните страни, трябва да бъдат поставени също така в услуга на следващия конгрес. В кореспонденциите си трябва да даваме повече конкретни данни за бурния растеж на материалната и духовната култура на нашата страна, за богатия български фолклор, за многобройните и твърде ценни паметници на древната култура по нашите земи отпреди повече от 2500 години, за любилишеното равнище на живота у нас, за природните забележителности и красоти на нашата родина и др. под. Колкото повече нашите кореспонденти се опознаят с България, толкова по-силно те ще пожелаят да дойдат у нас на конгреса на УЕА.

По-специално есперантистите от столицата трябва да развият в тази насока колосална дейност и да се поставят на разположение на LKK както през периода на подготовката, така и през време на самия конгрес. Ние, българските есперантисти, държим извънредно сериозен изпит пред нашите есперантски приятели от другите страни и трябва да го издържим с „отличен“.

Своевременно всеки трябва да си уреди въпроса за получаване на отпуск за конгреса, а също така да си запланива годишния отпуск, така, че да съвпадне с най-усилената подготовка на конгреса и с дните на неговите заседания — периода от 1 до 10 август 1963 г. Само така мнозина есперантисти ще могат да участвуват дейно както в предварителните мероприятия, така и в различните инициативи на конгреса.

Младежите-есперантисти трябва да се готвят за участие и в младежкия конгрес, който ще се състои във Враца от 1 до 3 август включително.



С цялата работа, която ни предстои да разгърнем, ние трябва да осигурим блестяще провеждане на конгреса в София и да покажем на есперантистите от целия свят, че в наше лице те могат да виждат надеждна опора в борбата за използване на есперанто в международните отношения за укрепването на приятелството и взаимното разбирателство между народите без разлика на общественно-политическите системи с цел да се запази най-великото благо на човечеството — мирът и вековните придобивки на човешката цивилизация и култура.

(daŭrigo sur p. 12)

David Sasonov naskiĝis la 24-an de decembro 1908 jaro en Asenovgrad. La infanjarojn kaj gimnazian studon li pasigis en sia naskiĝurbo. Kiel gimnaziano li estis tre diligenta kaj sciam. Dank' al tio en la lastaj gimnaziaj klasoj li jam scipovis perfekte la rusan, germanan kaj esperantan lingvojn.

Li naskiĝis kaj kreskis en meza komercista familio. Sed lin ne allogis la riĉeco. Ankoraŭ knabo kaj pli poste li amikiĝis kun malriĉulaj knaboj kaj junuloj de la urbo, kaj tio treege helpis lin de pli proksime ekoni ilian pezan kaj mizeran vivon. Per tio kaj pere de la helpo de sia pli aĝa frato-komunisto, li sukcesis firmiĝi kiel progresema junulo. Ankoraŭ gimnaziano li distingiĝis kiel talenta esperantisto. Li tradukis rakontojn de la famaj bulgaraj verkistoj P. Todorov, El. Pelin, Ivan Vazov, Ĥr. Smirnenski kaj pli poste kun sia plej proksima kamarado kaj amiko Ĥristo Gorov-Ĥrima tradukis la poemon „Septembro“ de Geo Milev. La traduko influis tre multe al David kaj de simpatianto al la Komunista junulara asocio li fariĝis organizita ĝia membro. Preskaŭ ĉiuj liaj esperanto-tradukaĵoj estis presitaj en la pli grandaj esperantaj gazetoj, aperintaj tiam en diversaj landoj de la mondo.

David Sasonov estis ankaŭ kapabla pedagogo. Ĉiujare li gvidis esperantajn kursojn, kiujn vizitis dekoj kaj centoj da asenovgradaj gelaboristoj. Li estis kapabla instrui la lingvon kiel al intelektuloj, same ankaŭ al laboristoj.

Sed li ne limigis sin nur per instruo de la lingvo. Post la kurshoro en malfrua nokto aŭ dimanĉe en ekskurso aŭ konferenco sur la montopintoj ĉirkaŭ Asenovgrad, li legis al ili aŭ klarigis la kaŭzojn pri la peza kaj mizera vivo de la laboristaro kaj, ke estas lando — Sovetunio, kie oni konstruas novan vivon.

Tie, li rakontis, ne estas mizero kaj senlaboreco, tie, ĉiuj homoj sentas sin egalaj kaj vivas kontente kaj feliĉe. Ofte okazis, ke kiam

la kursanoj eliris el la kursejo esti atakitaj de junuloj-faŝistoj. En tiaj momentoj David kvankam malforta, ne rapidis forkuri, sed ekstaris frunte en la interbatado.

David ege amis la simplajn laboristojn kaj al ili li dediĉis sian junan vivon. En la granda batalo de nia popolo kontraŭ la faŝismo ne malmulton alportis ankaŭ la laboristoj-esperantistoj de Asenovgrad, edukitaj de David. Multaj el ili kiel Ilija Mihajlov, Atanas Arabaĝiev, Nevena Jordanova, Veska Stojĉeva, Trajĉo Pamukĉiev kaj aliaj fariĝis partizanoj kaj heroe batalis por la liberigo de nia lando. Iuj el ili pereis en la glora liberiga batalo.

Inter la dekoj da sentimaj batalantoj samkiel en la vicoj de la laborista junulara asocio kaj Komunista partio, tiel ankaŭ en la esperantista movado en Asenovgrad, kiel brila figuro de altkultura, sindona kaj sentima antifaŝisto elstaras la figuro de nia kara kaj neforgesebla kamarado — la esperantisto David Sasonov (Davo).

Kiam ni parolas pri David Sasonov — la esperantisto, ni devas substreki, ke lia nomo estas ligita firme kun la historio de la Esperanto-movado en Asenovgrad. Ĉiuj sukcesoj, la tuta batalvojo de nia laborista Esperanto-societo kaj Esperanto-movado ĝenerale estas ligita kun la nomo, vivo kaj agado de David Sasonov.

Antaŭ kaj dum la Dua mondmilito David Sasonov staris firme sur antifaŝista pozicio. Li per ĉiuj siaj fortoj senmaskigis la rabmiliton de Hitler. Kaj kiam en 1941 la germanaj faŝistoj okupis nian landon kaj deklaris militon al USSR, kvankam la hitleranoj en la komenco de la milito havis provizorajn sukcesojn. David ne ŝanceliĝis. Sed troviĝis ankaŭ en Asenovgrad perfiduloj, kiuj subtenis la propagandon de Hitler. David senmaskigis iliajn mensogojn kaj inspiris al la ŝancelemaj fidon pri la fina venko. Li aktive helpis la partizan-movadon.

daŭrigo sur pĝ. 13

(daŭrigo de p. 11)

Няма съмнение, че всички български есперантисти — от ветераните до най-младите — ще вложат всичкият жар и ентузиазъм на своите сърца за достойно посрещане на това най-крупно събитие в живота на междunarодното есперантско движение през 1963 година — 48-ият конгрес на УЕА в София.

Никола Алексиев,
председател на ЛКК за 48-я УЕК

La faŝista polico ne povis toleri tian civitanon, kia li estis, kiu kuraĝe defendas sian landon kaj popolon. Iun nokton li estis forprenita de lia hejmo kaj ekzilita en la regionon de Zlatograd. Tie oni metis lin al netoreleblaj vivkondiĉoj. Senigita de libero, de nutraĵo kaj de kia ajn medicina helpo, lia delikata organizmo ne eltenis.

Ja 13-an de septembro 1942 ĝuste antaŭ 20 jaroj li mortis malproksime de siaj parencoj kaj kamaradoj.

David Sasonov mortis, sed nur korpe, lia spirito ĉiam ŝvebas inter ni — liaj kamaradoj kaj amikoj. Li ĉiam ĉeestas spirite en niaj kunvenoj, en niaj paroladoj kaj ekskursoj. Lian nomon portas nia societo, lian spiriton kaj humanecon sekvas niaj koroj.

En septembro 1962, kiam nia societo kun la partia, patrolanda, laborula, junulara kaj legeja organizzaĵoj celebros la 20-an mortotagon kaj la 54-an naskiĝtagon de David Sasonov, ni, la asenovgradaj esperantistoj, anoj de la societo, portanta la noblan nomon „D. Sasouov“, ankoraŭ foje deklaras, ke ni neŝanceleble sekvos la veran vojon desegnita de nia neforgesebla kamarado D. Sasonov. Lia nomo kaj figuro eterne vivos en la koroj kaj memoro de la asenovgradaj esperantistoj, senescepte ĉu komunistoj, patrolandfrontanoj aŭ senpartianoj. Ni neniam hontigos la helan nomon de nia patrono.

At. Gaev



Grupo da esperantisioj el Asenovgrad inter kiuj D. Sasonov

LA PAROLO DE NIAJ GASTOJ

DENOVE NI VIZITOS VIAN LANDON

Reveninte de mia vojaĝo el via lando mi volas esprimi al vi mian koran dankon pro via solidara helpo al mi. La vojaĝo tra via lando restas por mi neforgesebla, tuj post la kongreso amikoj veturigis min per Moskviĉ al Miĉurin. Tie mi pasigis kvar tagojn ĉe la esperantisto Kehajov. Poste mi estis gasto ĉe la esperantisto Dobri Dobrev. Kaj pere de lia helpo la distrikta komitato de komunista partio disponigis al ni du luksajn aŭtomobilojn por travojaĝi la regionon de Stara Zagora. Ni vizitis la rozo-instituton, la barajlagon „Georgi Dimitrov“, Šipka kaj Buzluĝa. Krome ni estis gastoj en Vinprom en St. Zagora kaj Ĉirpan, kaj en tabakfabriko en St. Zagora.

La radio-stacio St. Zagora prenis de ni intervjuojn, kaj ili sendis ilin en speciala rubriko. Estis la unua fojo, ke radio St. Zagora disaŭdigis en kaj pri Esperanto. Intervjuitaj estis la polino, la franco kaj mi. Ni, ĉiuj parolis pri la Esperanto-movado, pri la kongreso kaj pri niaj impresoj.

Mi sendis artikolon esperantlingvan pri miaj impresoj al la gazeto „Septembro“ en St. Zafora; ĝi intertempe jam estas publiigita. Post St. Zagora ni estis ankoraŭ en diversaj urbetoj kaj vilaĝoj, kaj spertis la helpemon de la bulgaraj esperantistoj.

Mi ne volas forgesi kaj rakonti tre interesan epizodon, kiu okazis al ni en Miĉurin. Ni migris laŭlonge de la plaĝo, venis du soldatoj, kiuj diris al ni ion bulgarlingve. Ni ne komprenis, kaj fine unu el la du soldatoj diris: „Limzono“. Mi diris al mia edzino: „Sonas kiel Esperanto“, tion aŭdis la soldato, kaj jam li salutis nin en Esperanto. Li estis juna esperantisto. Eĉ la direktoro de radio St. Zagora salutis nin en Esperanto, kvankam li ne estas esperantisto. Tio montris al ni, kiom disvastigita estas nia lingvo en Bulgario.

Ni revenis hejmen kun plej bonaj impresoj, kaj ni esperas, ke eble mi povus denove viziti vian landon en la sekvonta jaro.

Rudolf Burmeister,

Karl--Marx-Staat, GDR

MAJAJ IMPRESOJ EL NUNTEMPA BULGARIO

Estis por mi kaj por mia edzino granda honoro ĉeesti la 35-an nacian kongreson de la bulgaraj esperantistoj kaj restadi dum 13 tagoj en frata Bulgario. Se oni demandas al mi, kie pleje impresis min, mi hezitus kie komenci, ĉar multaj aferoj tre trafis min. Kiel esperantisto kaj kiel amiko de Bulgario mi havas pli multan scion pri la lando ol la ordinara samlandano mia, kiu — mi povas sen troigo diri tion — havas nenian scion pri Bulgario. Legi estas unu afero, sed propraokule vidi estas alia afero.

Jam el la vagonaro mi konstatis, ke oni ĉie estas konstruanta fabrikojn kaj domojn, kiuj sendube post mallonga tempo donas abundajn fruktojn al la laborema, pacama kaj bonkora bulgara popolo. Ĉie dum mia vojaĝo mi konstatis, ke en la kamparo oni vaste uzas



maŝinojn por rikolti kaj por plugi. Cio ĉi tre ĝojigis min. Ne nur la aspekto de la lando plaĉis al mi. Ĉie kaj ĉiam mi renkontis nur afablajn homojn, kun kiuj mi parolis ĉu esperantlingve, ĉu en iu alia okcidenteŭropa lingvo, ĉu per manoj kaj piedoj.

Ofte kortuŝis min granda amikeco kaj bonkoreco de sennombraj bulgaroj. Unu tre trafan ekzemplon mi volas citi ĉi tie. Reveturante al Nederlando venis bulgara konduktoro en nian kupeon por kontroli la vojaĝbiletojn. Rimarkante ke ni estas nederlandanoj, li tuj komencis afable rideti kaj amike manpremis nin, kvazaŭ ni estis bonaj konatuloj. Forlasante la vagonaron antaŭ la bulgara limo, li aparte vizitis nin denove en la kupeo por manpreme adiaŭi nin dezirante al ni germanlingve bonan vojaĝon kaj ĝis revido en Bulgario! Ni ne komprenis al kio ni ŝuldas tiun ĉi amikecon de tute nekonata homo. Estis vere kortuŝe.

Alia rimarkindaĵo por ni estis la preskaŭ neimagebla pureco de la stratoj. Kvankam nia lando estas konata en la mondo kiel la plej pura, mi devis kun honto konstati, ke ni pri tiu afero multon povas lerni de vi. Ankoraŭ alia afero estas la bonaj bulgaraj manĝaĵoj. Spertinte tion, estis des pli rimarkinde legi en nia gazetar, post kiam ni estis revenintaj hejmen, ke en Bulgario regas manko je manĝaĵoj?!

Resumante mi volas diri, ke nia restado en via gastama lando tre plaĉis al ni kaj ke ni baldaŭ esperas renovigi la konatiĝon kun la bulgara popolo. Mi kaj mia edzino dankas al ĉiuj tutkore pro la ĉie trovita amikeco kaj gastamo. Ĝis revido.

Ru Bossong,
Eindhoven, Nederlando

Stara Zagora. — Post la 35-a kongreso en Burgas gastis al la Esperanto-societo „Verda Stelo“ en Stara Zagora kvar fremdlandaj geesperantistoj: Irena Skorupa el Pollando, geedzoj Rudolf kaj Eva-Maria Burmeister el GDR kaj Jean Thomas el Francio.

La geesperantistoj el Stara Zagora bone gastigis ilin kaj montris al ili ĉiujn vidindaĵojn de la urbo kaj de ĝia ĉirkaŭaĵo. Dank' al la disponigo de du komfortaj aŭtomobiloj fare de la Urba Komitato de BKP la gastoj vizitis la Barajlagon „G. Dimitrov“ kaj la rozan valon apud Kazanlak, Ŝipka, la pintojn „Stoletov“ kaj „Buzluĝa“ kaj admiris iliajn belecojn. Siajn bonajn impresojn la gastoj esprimis per radio Stara Zagora, kiu elsendis en du tagoj iliajn parolojn. Tio estas vere ĝojiga fakto, ĉar radio St. Zagora por unua fojo elsendis en Esperanto. La paroloj de la gastoj estis belegaj kaj kortuŝaj.

La loka gazeto „Septemvri“ publikigis artikolon de Rudolf Burmeister el GDR „Feliĉa estas mi, ke mi estas en Bulgario“, kiu rakontas pri siaj bonegaj impresoj pri Stara Zagora kaj ĝia ĉirkaŭaĵo kaj admiras la atingitajn sukcesojn de Bulgario en la socialisma konstruado.

La gastoj restis tre kontentaj de sia vizito en St. Zagora kun sufiĉe da bonaj impresoj kaj promesis denove viziti nian landon kaj nian urbon.

Loveĉ. En nia urbo okazis tre interesa renkonto. Ĝojigajn horojn travivis ni, la geesperantistoj, en Loveĉ. La 8-an de aŭgusto k. j. en la lernejo „V. Lévski“ ni renkontiĝis kun 25-jara polino Irena Skorupa — gastino al XXXV kongreso de BEA — kiu en sia rondvojaĝo en nia lando ekdeziris viziti ankaŭ nian urbon. La renkontiĝo ĉeestis ĉirkaŭ 20 pli aĝaj kaj junaj geesperantistoj. Treege kora kaj varma estis la renkontiĝo!

La interparoloj kun Irena Skorupa oni faris nur en Esperanto kaj ni interkompreniĝis bonege. Ĉiuj geesperantistoj senpere kaj profunde konvinkigis pri la interkompreniĝo per la internacia lingvo Esperanto. La juna polino bonege posedas Esperanton kaj scipovas precize esprimi siajn pensojn kaj sentojn. Ŝi rakontis belege pri la granda ĉiaflanka progreso en la Pola popolo respubliko, pri la nova Varsovio, elkreskinta el la ruinoj, kaŭzitaj de la hitleristaj barbaroj.

Irena Skorupa rakontis ankaŭ pri siaj bonegaj impresoj kaj travivaĵoj en nia lando kaj nia urbo.

La renkontiĝo pasis en agrabla atmosfero kaj promonado al la pitoreska „Strateŝ“. Je la sekvanta tago la kara gastino forlasis nian urbon.

La geesperantistoj el Loveĉ komprenis, ke ili devas ankoraŭ pli obstine lerni Esperanton, por ke ili scipovu utiligi ĝin en kamaradaj interligoj kun fremdlandaj esperantistoj, kiel batalantoj por paco kaj amikeco inter la popoloj.

Inĝ. D. Dobrev

Stojko Fortunov



KISO EN LA MALLUMO

Scenejo: kupeo de unua klaso en vagonaro en Rumanujo dum la dua mondmilito.

Personoj: germana oficiro, rumana oficiro, maljuna sinjorino kaj ĉarma knabino.

La vagonaro eniras en tunelon. La vojaĝantoj aŭdas unue kison kaj tuj poste fortan frapon.

La vagonaro eliras el la tunelo kaj kuras denove en la lumo. Ĉiuj vojaĝantoj restas silentaj, sed la germana oficiro havas bluaĵon ĉe la okulo.

La maljuna sinjorino pensas: „Ŝi estas bona knabino kaj havas belan karakteron.“

La knabino pensas: „Ĉu ne estas freneze, ke la germano preferis kisi tiun maljunulinon kaj ne min?“

La germana oficiro pensas: „Tiu rumano havas bonŝancon; li ŝtelas la kison, kaj mi ricevas la baton.“

La rumana oficiro pensas: „Mi estas ruzulo. Mi kisas la dorson de mia mano, frapas la germanan oficiron en la vizaĝon, kaj neniu protestas.“

PARADOKSO

Post longa kaj argumentita prelego pri la realismo en la arto, iu aŭskultanto demandas al la preleginto: „Ĉu la bildo, prezentanta botelon da vino, pentritan per akvareloj, povus aparteni al la realisma skolo?“

LA TRI KONSILJOJ

— Vi trinkas la trian glason da vino, sed la kuracisto permesis al vi nur unu — riproĉis edzino sian edzon.

— Sed mi konsultis tri kuracistojn kaj ĉiu el ili permesis al mi po unu glason.

TRA LA GAZETARO

En „**Naroden Drugar**“ (Jambol) de 3. II. — informo de Georgi Jordanov — „Sukcesoj, kiuj ĝojigas kaj devigas“ — pri la konkurado inter la esperantistaj societoj en Jambol kaj Burgas.

En „**Dupniŝka Komuna**“ (Stanke Dimitrov) de 28. IV. — informo de P. Stojanov — „Per Esperanto al batalo por paco“ — pri la esperantista koncerto en urbo St. Dimitrov.

En „**Minjorski Zov**“ (Bobov dol) de 29. IV. — informo de Spas Mitov pri Esperanta kurso en la minejo.

En „**Septemvriŝko Zname**“ (Pazargik) de 16. V. — informo de M. Ĉolev — „La herooj estis honoritaj“ — pri la renkontiĝo honore al la pereintaj geesperantistoj-antifaŝistoj Vela Peeva kaj Stojko Kalpazanov en Velingrad.

En „**Stopanoved**“ (Varna) de 24. V. — artikolo de G. Dimov „Unu senmorta verko. Unu lingvo de la estonteco. 75 jaroj da Esperanto. Esperanto e la Supera Ekonomia Instituto“, kun portreto de L. L. Zamenhof.

En la sama ĵurnalo aperis alia artikolo de G. Dimov pri la laboro de la sciencaj kabinetoj ĉe la instituto kaj sciigo, ke docento M. Valkanov, dekano de Kontista fakultato, membro de E-societo „Albatro“, estis promociita profesoro.

En „**Ĉernomorski Front**“ (Burgas) de 1. VI. — sciigo pri la antaŭkongresa kunveno de la societo kun prelego de G. Dimov, kiu okazis la 1-an de junio 1962.

En la sama ĵurnalo de 12. VI. 1962 — longa artikolo de G. Dimov — „75 jaroj da Esperanto“.

En ĵurnalo „**Narodno delo**“ (Varna) de 29. VI. — sciigo pri okazonta antaŭkongresa kunveno.

En „**Rabotniĉesko delo**“ (Sofio) de 2. VII. — informo de I. Borisov — „Rivera komplekso Esperanto“ — pri la somerumejo sur la Danuba insulo Esperanto.

La sama sciigo aperis en „**Oteĉstven front**“ (Sofio).

KOREKTO

En n-ro 7-8, paĝo 14 en la raportaĵo „Por la paco kaj la amikeco“ en la dua kolono, 4-a linio la korektinto erare korektis la ciferon 1600 al 1800. Temas pri la nombro de la kongresanoj — pli ol 1600. La samo validas pri la ĉefartikolo, linio 3.

DEZIRAS KORESPONDI

RUMANIO

Raducanu Suzana, str. Stroe Postelnicu 11, Bukuresti 30; Barbu Angela, str. Bogdan Hasdeu 12, et. 1, ap. 3, Bukuresti 5; Radu Ana, sr. Caporal Bulugea 8, r. 1 Mai, Bukuresti; Bpecca Eleonora, filologia studentino, str. Aca-Bemici 7, Bukuresti 45 — ĉiuj deziras korespondi kun ĉi pri ĉt.

Tibulca Alexandro, str. Dumbrava Minunata 13, Falticeni — en Esperanto, angla kaj franca lingvoj. Interŝ. fotojn de la filmaktoroj, poŝtmarkojn, librojn.

Geesperantistoj (17—45 jaraĵ) kun ĉi pri ĉt en Esperanto, franca, angla, hispana kaj itala lingvoj; interŝ. Pl, fotojn de aktoroj, PM, gazetojn, librojn, gramofondiskojn. Skribu al adreso: Tibulca Al, Buciumeni, Falticeni.

HUNGARIO

Sándor Termes, Budapest IX, Vendel u 34 — kun eksterlandanoj, kiuj partoprenis la liberigan batalon de la hungara popolo kontraŭ la faŝismo. Ekzemple kun bulgaroj, kiuj partoprenis la I-an bulgaran armeon, kiu batalis por liberigo ge Hungario.

ĈEĤOSLOVAKIO

Boril Josef, Stalinova 9, Hradec Králové 4 — kun ĉi pri ĉt, interŝanĝas PM, Pl, emblemojn.

POLLANDO

Krystyna Przemieniecka (instruistino, 22 jara), Olownik (p-ta Olszewo Węgorzyskie); pow. Węgorzewo; woj. Olsztyn — kun bulgaroj pri kulturo, geografio, popolaĵ kutimoj, turismo; interŝ. fotojn, gaz., Pl.

JUGOSLAVIO

16-jara esperantistino deziras korespondi kun seriozaj gesamideanoj. Al multaj skribaĵoj ŝi ne ricevis respondon; Katica Šoster, Kersnikova — 6 a, Celje

GRAVA ANONCO POR KORESPONDEMULOJ

Jenaj gravaj tag- kaj semajn-jurnaloj publikigas **senpage** korespond-petojn de eksterlandanoj, rekte senditaj de fremdlando al ĝiaj redakcioj

Bonvolu skribi la korespond-petojn en Esperanto kaj indiku viajn sekson, aĝon, lingvon (Esperanto aŭ aliaj) kaj deziratan korespondtemon (eventuale ankaŭ viajn hobiajn, interesojn, kolektojn k. t. p.)

Bonan okazon por montri la disvastiĝon de nia Esperanto.

- 1) AFTONBLADET
"Ett ögonblick redaktörn"
Vattugatan, 12
Stockholm, Svedio
- 2) IL GIORNO (DEI RAGAZZI)
Corrispondenza Internazionale
Milano, Italio
- 3) CORRIERE DEI PICCOLI
Milano, Italio
- 4) L'UNITA
Roma, Italio

GERMANIO

Herbert Sonntag, Hetzdorf 46 d über Freiberg/Sa. 2 — interŝanĝas PM el ĉi.

ANGLIO

Teny Jukes, 21, Highfield Road East, Bidulph, Stoke-on-Trent Staffordshire.

INDONESIA

B. Antonius, Sjmangjuntak, Pengok, DKA B/16, Jogjakarta — kun studentoj el Bulgario

BULGARIO

Dimêo Nikolaev Maĝarov, str. Hr. Iv. Karpačev 22, Loveč; respondo garantota.

Ĉefredaktoro: Violin OLANOV

Redakta komitato: Kiril DRAJĖV, Atanas LAKOV, Canko MURGIN (vicĉefredaktore)
Ivan SARAFOV, Simeon SIMEONOV.

Korektis: Vasilka Petrova

Adreso de la redakcio: Sofio, poŝtkesto 66. Tel. 7-46-01

